La frato de Ludoviko estas granda kaj forta, sed Ludoviko estas malgranda kaj malforta. La libro estas sur la tablo kaj la plumo kuŝas sur la fenestro. Tiu papero ne estas pura - ovvero - estas malpura. La seĝoj estas novaj. La tablo estas malnova, sed ĝi (essa) estas utila. La papero estas blanka, sed ĝi estas peza. La bela infano ploras; ĝi volas manĝi. Ludoviko legas volonte. Tiuj kraĵonoj estas ruĝaj; kie estas la bluj kraĵonoj?

Osservazione — Quando l'aggettivo non è separato dal nome mediante un verbo, generalmente si pone prima del nome.

Pronunzia di alcune lettere dell'Alfabeto Esperanto

Per la maggiore uniformità della pronunzia dell'E., specialmente per coloro che imparano da soli, riproduciamo il seguente prospetto pubblicato dalla Federazione Esperantista Umbra e compilato sulla base della grammatica dello Zamenhof, secondo l'ottima traduzione del benemerito Prof. G. Puccinelli, dal Prof. Alessandro Mazzolini, che ringraziamo vivamente di avercelo favorito.

Nella lingua internazionale « ESPERANTO » ogni suono semplice è rappresentato sempre da una stessa lettera, e ogni lettera rappresenta sempre lo stesso suono, qualunque sia il suo posto nella parola, e qualunque sia la lettera che la precede o la segue. Solo per quindici lettere è necessario dare schiarimenti sulla pronunzia; tali schiarimenti, facilissimi, sono tutti compresi nel seguente specchio:

Lettera	PRONUNZIA	E S E M P I	
		Con parole non Esperanto	Con parole Esperanto
C	Tso (aspra).	Marzo; zio; fez.	Libereco (libertà); cemento (cemento); danci (danzare); Decembro (dicembre).
Ĉ	Ĉiò.	Aceto; pace; ciurma.	Ĉielo (cielo); ĉirkaŭ (circa); ĉambro (camera).
E	È (stretta).	Re; vena; fede; venti (numero).	Libertempo (vacanza); Decembro (dicembre); jes (sì); ne (no); esperanto (sperante, che spera).
G	Go.	Ago; ghetto; egro; ghirigoro.	Gaŭto (gaio); alegorio (allegoria); granda (grande).
Ĝ	Ĝiò.	Gelo; gengiva; aggiungere.	Fariĝi (diventare); larĝeco (larghezza); ĝermo (germe).
H	Ho (aspirata tenue).	Francese: hache (scure). Tedesco: Hund (cane).	Hundo (cane); hieraŭ (ieri); havi (avere).
H	Ho (asp. gutturale).	Tedesco: Buch (libro).	Hemio (chimica); mehaniko (meccanica); haoso (caos).
J	Jo (semivoc.)*	Olio; notajo; noja.	Agoj (azioni); Jes (sì); jaroj (anni); fajro (fuoco).
Ĵ	Sgìo (strisciante dent).	Franc.: Journal (giornale); Dijon	Kreskaĵo (pianta, vegetale); ĵurnalo (giornale); ĵeti (gettare).
K	Ko.	Coca; credo; chicche.	Kudrilo (ago); reklamo (pubblicità; Francese: réclame).
O	O (stretta).	Roma; amore.	Esperanto (sperante); Romo (Roma); Peruĝio (Perugia).
S	So.	Sella; sasso; polso.	Sabato (Sabato); skribisto (scrivano); sinjorino (signora).
Ŝ	Sciò (strisc.).	Florescio; scena; seiam; francese: chat (gatto).	Ŝajni (parere); nekaŝema (franco, aperto); poŝta (postale).
Ŭ	Uò (semivocale).**	Laura; laude; Europa.	Aŭdi (udire); Eŭropano (Europeo); laŭdo (lode); laŭte (ad alta voce).
Z	Zo (dolce).	Orzo; zelo; ziznania; zona;	Zono (cintura); zoologio (zoologia); senzorga (negligente); ruza (furbo).

* J (jó) — Questa semivocale si pronunzia come la vocale *i* nelle parole italiane, ma nella sillabazione vale come consonante; perciò non può formar sillaba se non è unita a una vocale; quando è preceduta o è seguita da una vocale, i due suoni si fan sentire unendoli rapidamente. Es.: Kaj (e); vej-no (vena); jes (sì); faj-ro (fuoco). Ma se la *j* sta fra due vocali, fa sillaba con la seconda. Es.: Kra-jo-no (matita); i-a-fo-je (talora); Ma-jo (Maggio); preĝe-jo (chiesa).

** Ŭ (uò). — Quest'altra semivocale à lo stesso suono della *u* italiana, ma essa pure, come la *j*, nella sillabazione vale come consonante, e forma sempre dittongo con la vocale *a* oppure *e*, che la precede. Es.: Laŭro (lauro, alloro); Eŭropo (Europa); kaŭzo (causa); leŭtenanto (tenente, luogotenente).

LA HUMORAJ NOVELOJ

LA ORAJ HORLOĜO KAJ ĈENO

(La sceno okazas en apartamento ĉe interna korto, ne luksa, sed riĉeta. La vidva pensiulino, kiu en ŝi loĝadis, mortis kaj estas entombigita en tiu tago mem).

La vicpordistino. (Supreniras, malfermas la pordon, eniras la loĝejon. Emocie ŝi rigardas la meblaron. Ŝi iras poste en la kuirejon kaj, kvankam honestanima, ŝi meditas kiajn el la iloj de la kuirejo, ŝi povas forpreni. Tamen ŝi konstatas, kun miro ke la malgrandaj iloj jam estas ĉiuj forprenitaj).

La servistino. (Kun la okuloj ruĝaj pro plorado, suprenvenas nigre vestita, kun nigra tuko sur la kapo). Kaj vi, vicpordistino, kion vi serĉas tie ĉi?

La vicpordistino. Mi vidis tra la pordo ke ili jam revenas. Mi suprenvenas por reordigi. Ĉu la funebra ceremonio estis bela?

La servistino (ekploras).
(Longedeŭra paŭzo).

La vicpordistino. Mia kara fraŭlino, mi ne parolas pri ĝi, sed pri mia kribrilo kiu estas tiel difektata ke... se la fraŭlino ja ne bezonas la kribrilon, tiam mi... ne estas plu iu, kiu devas kribrilo la bulĵonon.

La servistino. Oni ne povas forporti ion. La filo de la sinjorino estas ĉi tie kaj li inventaras ĉion. (Ŝi eniras en sian ĉambreton kaj rigardas ĉu ŝi bone kaŝis la kribrilon. La parencoj supreniras la ŝtuparon).

La filo de la vidvino. Sidigu... Mario, ĉu estas hejme io por manĝi?

La servistino. (Ŝi iras kaj revenas inter la parencoj). Iom da marmelado...

La sinjorino. Malfeliĉa onklino Luizio, ankaŭ tiun ĉi ŝi faris, tiel akurate. Me-

tu, knabino mia, kvin aŭ ses vazetojn da ĝi en korbeto: mi ilin kunportos kiel rememoraĵon. Tie ĉi estas plunenu kiu, povus manĝi marmeladon... (sincere ŝi ploras).

La filo. Lasu min sola, lasu min... (Li sidigas ĉe la angulo de la kanapo kaj fikse rigardas antaŭ si. Interbabilado mallaiŭta. La virinoj iras kaj revenas).

Alia sinjorino. (Ekgemetante) Ah! Ah! Tiel estas!

La unua sinjorino. Tiel finas ĉio.

(La filo levigas, iras al la ŝranko kaj ĝin malfermas. Li eltiras kesteton de cigaroj en kiu troviĝas kelkaj malgrandaj objektoj: ringoj, brelokoj, pingloj, bukoj, luksaj butonoj, ĉapelornama birdo, argenta broĉo, maningo kaj ora horloĝo kun ĉeno. Li demetas ĉion sur la tablo).

La filo. Forportu kun vi rememoraĵon de la malfeliĉulino.

(Granda silento. Neniu kuragas alproksimiĝi al la objektoj).

La filo. (Invitante). Elektu do ian bagatelon.

La sinjorino. (Alproksimiĝas kaj transerĉas tra la objektamaso). Kiom da aĵoj havis la malfeliĉulino... (Ŝi rigardas plezure la horloĝon kaj la ĉenon).

Alia sinjorino. Mi... mi... dezirus senvaloran objekton... Tiun ĉi butonon. Aŭ pli bone tiun ĉi bukon. (Tamen ŝi rigardas la horloĝon).

La unua sinjorino. Nu, ĉu vi ne forportas la bukon?

La alia sinjorino. Ne. (Ŝi pensas ke se ŝi forprenas nun la bukon, al ŝi ne restas plu la espero havigi al si la horloĝon).

La unua sinjorino. (Turnigante al knabineto). Jen, junjo, forportu la bukon. Ĝi estis de la malfeliĉa onklino Luizio. (Ŝi mandonas al la knabineto la bukon por forigi de la amaso la objektojn senvalorajn).

La alia sinjorino. Prenu, Junjo, ankaŭ la butono estas via.

Junjo. Dankon. (Ŝi rigardas la horloĝon).

La unua sinjorino. Kiu deziras la birdeton? (Granda silento. Neniu volas riski pro la birdo sian rajton je la horloĝo. Ĝenerale komencas superregi la penso, ke la horloĝo restos al la lasta kaj tiam ĝin ricevos tiu, kiu laste sin anoncos. Do granda silento).

Tria sinjorino. Junjo, ĉu vi ne volas tiun birdeton?

Junjo... (Ŝi rigardas la horloĝon). Ne. Mi redonas ankaŭ la bukon; mi redonas ankaŭ la butonon. (Ŝi demetas la bukon kaj la butonon).

La unua sinjorino. Tio estas maldececo. La buko kaj la butono estas viaj. (Ŝi forprenas ilin el la amaso kaj ilin redonas al la knabino). Konservu bone kion vi ricevis. Ĉi tie oni ne povas elekti. Ĉu vi ne hontas?

Junjo. (Ekploras tenante en sia mano la butonon kaj la brikon, kaj ŝi komprenas ke nun nenion plu ŝi povas esperi). Tiokaze... tiokaze... donu al mi ankaŭ la birdeton. (Rapidage tri manoj samtempe donas al ŝi la birdon. Junjo estas kontentigita kaj ŝi apartigas. Granda silento).

La unua sinjorino. Kiel bela horloĝeto! (Granda silento).

Alia sinjorino. Alekso, ĉu estas vere ke vi konservos ĝin?

La filo. Mi nenion konservos... (Ĉiuj alproksimiĝas al la tablo).

La unua sinjorino. (Prenas en la mano la horloĝon) Mirinda horloĝeto... (Ŝi

fortiras el la objektamaso ankaŭ la ĉenon)... kaj kiel ĉarma eta ĉeno! Ĉu vere? ankaŭ tiu ĉi estas parto de la horloĝo?

La alia sinjorino. Jes, jes. Kunigu la ĉenon kun la horloĝo! (Ŝi pensas ke ankaŭ ŝi povus gajni la horloĝon kaj tiokaze estas plibone ke ankaŭ la ĉeno estu kunigita kun ĝi. Same pensas ankaŭ la alia kaj pro tio ŝi kroĉas tuje kaj forte la ĉenon al la ringo de la horloĝo).

Tria sinjorino. (Iom nerve). Tre bone. Sed nun demetu ĝin.

La unua sinjorino. (Ne ĝin demetas). Malfeliĉa onklino, ŝi kunportis ĉiam tiun ĉi horloĝeton. (Sed ŝi ne ĝin demetas). Ĉu vi rememoras kiel estis eleganta sur la vestaĵo el nigra silko tiu ĉi maldika orĉeno? Ŝi ĝin portis tiele, he? (Ŝi ĝin metas ĉirkaŭ la kolo. Ĝenerala konsterneco).

La alia sinjorino. Jes, tiamaniere. Sed nun deprenu ĝin.

La unua sinjorino. (Ŝi deprenas ĝin de la kolo sed ŝi fortetenas ĝin en siaj manoj). Ŝi ricevis ĝin de sia mortinta edzo.

La alia sinjorino. Jes, jes, sed demetu ilin.

La tria sinjorino. (Energie). Demetu do: ili tion diris al vi tiom da fojoj.

Malgrasa sinjorino. Estas ĉi-tie braceleto el nigra ostoj. Funebra ornamaĵo; kiu deziras ĝin..? (Neniu respondas). Estas ĉi-tie broĉo « Rememoraĵo de Venecio »; kiu volas ĝin?

Unu el la sinjorinoj. (Malavare) Forportu do ambaŭ.

La malgrasa sinjorino. Mi neniam iris Venecio'n. (Ŝi demetas la broĉon). Kiel bela malgranda horloĝo! Donu ĝin tiuj al mi, por ke mi ankaŭ povu ĝin rigardi.

Unu el la sinjorinoj. Donu ĝin al ŝi.

Multaj sinjorinoj. Donu ĝin do, por ke ŝi povu rigardi.

(Ili pensas ke la alia tenis ĝin jam tro longatempe en siaj manoj, kaj ke ĉe la malgrasulino la horloĝo ne estos en danĝero).

La unua sinjorino. (Donas al la malgrasulino la horloĝon, sed ŝi tenas la ekstremajon en la mano). Ĝi havas duoblan ujon.

La malgrasa sinjorino. Lasu tute la ĉenon.

La unua sinjorino. Vi povas rigardi ĝin ankaŭ tiamaniere.

(La ĉeno rompiĝas kaj de tio oni komprenas ke ili kuntiris ĝin samtempe. La koroj pli forte batas; oni jam sentas, ke estas akra batalo pri la horloĝo).

La malgrasa sinjorino. Jen, vi rompis ĝin.

La unua sinjorino. Vi, ĝin ŝiris.

La malgrasa sinjorino. Ĉu mi? Sed kiel vi povas diri tion? (Subite ŝi komprenas ke la plilonga parto de la ĉeno, kune kun la horloĝo, restis en sia mano kaj ke ŝi povas porti ĝin ankaŭ tiamaniere). Tio ne estas granda domago.

Unu el la sinjorinoj. (Kiu ĝis nun ne parolis). Kie estas la rememoraĵo de Venecio? (Ankaŭ ŝi proksimiĝas al la horloĝo).

La unua sinjorino. Nu... nu... pli delikate. (Ŝi puzas ŝin flanken).

La nova sinjorino. Sed vi bonvolu montri ankaŭ al mi tiun ĉi horloĝeton.

Ĉiuj sinjorinoj (al la malgrasulino). Donu ĝin al ŝi.

(Ĉar la afero plej grava estas, ke la horloĝo ne restu longatempe en mano de iu kaj ke ĝi estu tenata prefere de la eksterkonkursanoj, kaj ne de tiu kiu montris energian intereson por havigi al si rajton).

La malgrasa sinjorino. (Donante ĝin). Je duobla ujo.

La nova sinjorino. (Trankvile bone). Mi elektas tiun ĉi.

(Generala timo ke tiu ĉi afero, ŝajne tiel malfacila, povu solviĝi tiel simple).

La unua sinjorino. (Nerve). Pardonu, vi petis la rememoraĵon de Venecio.

La nova sinjorino. Ĉu mi? Mi nur demandis, kie ĝi estis. (Ŝi estas metonta la horloĝon en la sakmonujon).

Iu sinjorino. Sed pardonu, tio ne decas.

Alia sinjorino. Tiu ĉi estas valora objekto. Oni elektas bagatelon, rememoraĵon sed ne oran horloĝon kun ĉeno.

La nova sinjorino. (Enmetas la horloĝon, trankvile). Elektu tial senvalorajn.

(Ŝi estas forironta. Ŝi iras antaŭ la spegulon, ŝi alĝustigas al si la ĉapelon. Unu post la alia, ĉiuj delasas la tablon kiu de ĉi momento ne plu valoras kaj ĉiuj amasiĝas ĉirkaŭ la ruza sinjorino kiu direktas la vizaĝon al la spegulo. Ĉiuj rigardas en la spegulo, ili rigardas sin reciproke kaj ili interparolas).

La unua sinjorino. Kion ni elektos, se ŝi forportis la plej belan aĵon?...

La sinjorino je la horloĝo. Tio ne gravas... mi ne elektis ĝin por tiu ĉi motivo... sed iu devis ja ĝin forporti.

Alia sinjorino. Almenaŭ redonu la ĉenon.

La sinjorino je la horloĝo. Ho, ĝi estas rompita! (Ŝi alĝustigas al si la antaŭon de la bluzo per dekstra mano). Fartu bone, mia kara Alekso.

La filo. Mi vin ĉirkaŭbrakas, onklino Antonio. Tiom da dankoj por via bonneco.

La onklino Antonio (ĉar estas ja ŝi). Ne diru al mi ion, mia nevo. Vi scias kion mi amis vian malfeliĉan patrinon... (Ŝi ploras kaj foriras. Longedaŭra paŭzo).

La unua sinjorino. Tiu sinjorino forportis la horloĝon. (Ŝi tre bedaŭras sed enpoŝigas la restaĵon de la ĉeno).

La malgrasa sinjorino. Sed almenaŭ kie estas la rememoraĵo de Venecio?

(La rememoraĵo de Venecio malaperas. La funebra ornamaĵo ankaŭ malaperas. Nun, sur la tablo, nur restas ostbutonoj, ĉar post la forpreno de la horloĝo, la malmultvaloraj objektoj anstataŭas ĝin, kaj iom post iom ili malaperas).

La malgrasa sinjorino. Kaj ĉu al mi restas nenio?

(Junjo nun timas ke oni depronu al ŝi ankaŭ kion ŝi ricevis: tial ŝi levigas kaj foriras).

La malgrasa sinjorino. Junjo, redonu al mi la bukon: al vi restos la butono kaj la birdeto.

Junjo. La birdeton mi redonas al vi.

La malgrasa sinjorino. Mi ne volas ĝin. Donu al mi la bukon.

Junjo. Tiuokaze mi donas al vi nenion. (Ŝi estas forironta).

La malgrasa sinjorino. (Akre). Bone... Donu al mi do la birdeton. (Ŝi enmetas malmilde en la sakmonujon la okulvitran koliĵon kaj eliras ne salutante. La aliaj sekvas ŝin. Sur la tablo ankaŭ la ostbutonoj malaperis. La hejmo malpleniĝas. La filo tute sola ploras en anguleto de la kanapo. Vesperigas. La servistino eklumigas la elektran lampon).

Esp. E. Filippi

ITALA KRONIKO

Perugia. Okaze de malfermo de E-kurso de nia grupo la prez. Adv. Orfeo Buattini kaj la sekr. Nazareno Boccioli bone paroladis. Koncernajn afiŝojn oni publikigis en la urbo.

Trieste. 17-2-27, IV jarkunveno de nia grupo. Multnombraj gosamideanoj ĉeestis. S-ro Stefanelli faris rilaton pri agado dum la pasinta jaro kaj kasisto s-ro Ratisa laŭtleĝis la ekonomian rilaton. Oni elektis poste la estraron en la jenaj personoj: Prez. Kav. D-ro A. Ghez, Viceprez. Kav. D-ro P. Polidori, Sekr. Marŝalo Verdi-Colombo, Kas. Rag. A. Ratisa, Direktoroj Rag. G. Stefanelli kaj Ing. A. Levi, Rev-oj s-roj Löw, Milloch kaj Tusulin.

Notinda dato por nia movado la 15-a februaro. Ĉe la Prefekturo, sub la direktado de Viceprefekto Comm. Riva, okazis la unua ekzameno de Esperanto. D-ro Ghez partoprenis la ekzamenan komision kaj tiaokaze parolis pri la graveco kaj disvastigo de nia afero. Pluraj universitataj profesoroj, kiuj aŭdis la unuan fojon Esperanton, deklaris ke ĝi estas belsona, harmonia kaj facila. La kandidatoj bonsukcesis la ekzamenon.

La 12-2 okazis la ĉiumonata festo, al kiu, agrablaj gastoj, partoprenis pluraj studentoj de Padova Universitato, kiuj havis en Trieste la «festa delle matricole».

ISTITUTO EMILIANO DI ESPERANTO CORTEMAGGIORE (Piacenza)

La Direzione, allo scopo di aggiornare gli elenchii degli insegnanti appartenenti all'Istituto, invita tutti i Katedranoj a voler trasmettere con cortese sollecitudine, i seguenti dati: *Cognome, nome, professione, categoria* (Membro effettivo, straordinario, insegnante), *indirizzo preciso e possibilmente la data d'appartenenza all'Istituto Emiliano.*

Il Direttore Prof. P. Modesto Carolfi

S O C I A V I V O

Edziĝoj. En Vicenza samid. Johano Evangelista kun f-no Paola Ronca. Bondezirojn.

Naskiĝo. Al sam-oj Prof. Ivo kaj Lisetta Vianello, en Gemona (Friuli), filineto: Marisa. Korajn bondezirojn.

Nekrologoj. Al F-noj Nella, Rina kaj Etta Zinzani en Parma mankis onklino N. D. Ester Ortalli-Bergonzi-Zinzani.

En Genova mortis S-no Felice Sonnino V. Segrè, patrino de niaj fervoraj sam-oj Cav. Umberto, S-no Gemma, F-no Viktorino Segrè.

En Palermo mortis S-no Luisa Caico Hamilton, patrino de sam. Federico Caico, klera literatura verkistino, konata en Italujo kaj eksterlande.

Varmajn kondolencojn.


Oficiala Klasika Libro

Edizione ITALIANA, SPAGNOLA, PORTOGHESE

compilato dall'Accademia Esperantista

Prezzo L. 3.60

Presso la nostra Rivista



J. MANGADA ROSENHÖRN, Ferdinando VI kaj Farinelli (historia novelo proze kaj verse originale verkita) Madrid, 1926, Glorietta de Bilbao 1, pp. 32, fr. sv. 0.70.

Tiu novelo estas la unua numero de nova Hispana Esperanta Biblioteko, kies Direktoro, s-ro Rosenhörn, intencas eldoni ĉiujare dekdu kajerojn pri literaturo, legendoj, arto de Hispanujo.

Ferdinando IV, reĝo de Hispanujo († 1759) kiu estis tre malsana kaj melankolia, rapide ekbonfartis dank'al la kantoj de itala artisto Farinelli, kiu baldaŭ por siaj konsilaj sukcesas montri al la reĝo multajn intrigojn de la korteganoj, kiu repacigas la reĝon kun la reĝino kaj ludas gravan rolon en la hispana politiko.

Rakonto leginda. e. m.

TH. MONNENS, S. J., Nova Afriko, el nederlanda trad. Floriano, 24 pp. «Espero Katolika», 55 rue de Vaugirard, Paris 7, fr. 1.50 (unu respondk.)

Interesa estas la kompatinda historio de tiu mondparto, kiu estis la sklavomerkato de la mondo dum kvar jarcentoj, ĝis kiam la Eklezio alportis al ĝi la «ĝojan anoncon». Antikva Afriko multege suferis, despli alte nova Afriko levigis; ĝi volas forskui ĉiun jugon de Blankulo. — La verketo de Th. Monnens ekvidigas la revivigon de tiu nigraŭta popolo, kiu laboradas por sia savo.

e. r.

LIBROJ RICEVITAJ

Oni recenzos nur verkojn duope senlitajn.

Baha'u'llah kaj Lia Misio, D-ro J. E. Esslemont, Bahaa Esp.-Eldonejo Friedrich A. Gerstner, Wandsbek-Oelmühlweg 66 (Germ.)

Bukedo, kolekto de literaturaj originalaj kaj tradukitaj de diversnaciaj aŭtoroj, reviziita de Zanoni, II. vol., T. & H. Jung, Horrem b. Köln, 1926, M. 0.70.

Datoj kaj faktoj pri la Paco Movado, Anna T. Nilson, Matmø, Seedio, 1926, Krono 1.

Dresden, 6-p. gvidfolio eldon. de la Societo Dresden de Germana E.-Asocio sub aŭspicijoj de UEA-turisma servo.

Esperanto-Schlüssel (germana), Ellersiek & Borel, Berlin SW 61, Wilmstr. 5, Pfg. 10.

Etiko, P. Kropotkin, 200-paĝa vol., el rusa trad. I.S.A.B., Sennacieca Asocio Tutmonda, Leipzig, Colmstr. 1, 1926, M. 1.

Esperanto-Krestomatio, unua legolibro, Instruisto Taubmann, «Maŭto», Haida, Bohemio, 1926, K. 1.

Invito al la 16 Internacia Feto de Frankfurt a. M., 27-30-3-27. Je la memo de P. Vivo, E. Izgur, Filozofi-Lirikaj Fragmentoj, Sennacieca Asocio Tutmonda, Leipzig-O 27, Colmstr. I-III, M. 2.

Jarlibro de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio, 1926, Paris, Esperantista Centra Oficejo, 61, rue de Clichy, Fr. 2.

Kantaro Esperanta, kompilita de Montagu C. Butler L. R. A. M., British E. Association, London W. C. 1, 17 Hat Street, s. 1.6.

Krimo de Fan, Naŝja Ŝiga, Esperanto-Kenkju-Ŝa, 2 Ĉōme Motozono-ĉō, Kojimachi, Tokio, Jap., Fr. sv. 0.70.

Kuzeto, scena bagatelajo en unu akto de M. Baluki, «Esperantista Voĉo», Jasio, kaj Centra Libroj Esperantista, 51 rue de Clichy, Paris, fr. sv. 0.25.

Köln apud la Rejno, 16-p. broŝuro, ilustr., eld. de Urba Trafik-Oficejo, Köln.

Nyckel till Esperanto (sveda ŝlosilo), Förlags-föreningen Esperanto u. p. a., Stockholm 1, öre 10.

Niĉjo Mensogulo kaj aliaj rakontoj, de I. Al. Bratescu-Voinesti, Bibl. Tutm. n. 10, Rudolf Mosse, E.-Fako (ĉiu kolekto de 10 n-roj M. 6), Berlin S W 19, Jerusalemstr. 46-49.

Rapido, Esperanto-Stenografio, laŭ oficiala germana unueca sistemo, verkita de Karp Wallon, Ellersiek & Borel, Esperanto-Verlag, Berlin, 1927, Gm. 1.

Oficiala Klasika Libro de Esperanto (Itala, Hispana kaj Portugala Partoj) Esperantista Akademio, Paris, 1927, Esper. Centra Oficejo, 61 rue de Clichy, Fr. 3.

Postmorta Vivo, el «La Rakontoj el Spirita Mondo», Aĵabe, Kioto-fu, Japanujo.

Pilgrimo, Julio Baghy, Hungara Esperantista Societo Laborista, Budapest, VIII, József-Körut, 9, I. B. M. 1.

R. U. R. (Rossumaj Universalaj Rabotoj), Karel Čapek, kolektiva dramo, Onolow, 1926, Nocosady, Moravio, ĉe S-ro Ant. Kudela - Sv. Fr. 2.

Raporto de Aerologia Observatorio de Tateno, n. 1, eldonita de la Aerologia Observatorio, 214-paĝa vol., cm. 35x25,5 kun 9 ilustr., diagramoj ktp., Taleno apud Tokio, Ibaraki-Ken, Japanujo, 1926.

Scottish Scenery (Skotlanda pejzaĝo), Higgie kaj Kio, Rotsa, Skotlando, Peneoj 2.

Sprechen Sie Esperanto (Ĉu vi parolas esperante?), D-ro E. Pfeffer, Styrrermühl-Verlag, Wien, 1927, Gumpendorfer Str. 42 M. 0.25.

Ŝtato kaj Revolucio, M. Lenin (V. Uljanov), el rusa trad. G. Demidjuk, 150-paĝa vol., Sennacieca Asocio Tutmonda, Leipzig, 1926, Colmstr. 1. M. 1.

Torquay, 4-p. gvidfolio eldon. de Torquay Publicity Committee kaj Turisma E.-Servo de UEA.

Universala Esperanta Lernolibro, D-ro A. Möbusz, I parto Por kursanoj, E.-Verlag Ellersiek & Borel, Berlin und Dresden, M. 2.

— II parto: Por kursgvidantoj, M. 1.50.

Molto materiale aspetta di essere pubblicato per mancanza di spazio.

Tipografia Editrice A. Paolet, S. Vito al Tagliamento A. Paolet, dir.-resp.

COMBINAZIONI PACCHI LIBRI AL MASSIMO BUON PREZZO

PACCO N. 1.

1. Rememoroj de Esperantisto, 5
2. Gvidlibro tra Trentino, 3.50
3. La Patro, 1
4. Kantanta Kamparo, 1

TOTALE L. 10.50 PER L. 7.

PACCO N. 2

1. Kvin noveloj, Tuglas, 20
2. En la fino de la mondo, 4
3. Popi kaj Huhuu, 2

TOTALE L. 26 PER L. 15

PACCO N. 3

1. Morgaŭ matene, dramo, 6
2. Penseroj, 1.20
3. Libretto rosso, 1
4. La Padova Lilio, 5
5. Epizodo de milito 1
6. Rimini, 2

TOTALE L. 16.20 PER L. 10

PACCO N. 4

1. Floretoj de S. Francisko, 6
2. La Padova Lilio, 5
3. S. Francisko, 2.50
4. Assisi, 2
5. De Apeninoj ĝis Andoj, 2.50

TOTALE L. 18 PER L. 12

PACCO N. 5

1. Ŝakludado, 3
2. Dua Eksercaro, 1
3. Rimini, 2
4. Vi sola, Esperanto..., 1.50
5. Parva Grammatica, 1
6. Statuti e Regolamenti della Cattedra Italiana d'Esperanto, 1.50

TOTALE L. 10 PER L. 6

PACCO N. 6

1. Elementoj de Geometrio absoluta, I. vol., L. 13.50
2. Elementoj de Geometrio absoluta, II. vol., 13.50

TOTALE L. 27 PER L. 16

PACCO N. 7

1. Bildotabuloj por la instruado de Esperanto, L. 15
2. La pesto en Milano dum 1630, 2
3. De Alpoj al la Maro, 2 kajeroj, 5
4. Terni, 1
5. Parva Grammatica Inter. idiom. E., 1
6. Vi sola, Esperanto..., 1.50

TOTALE L. 27.50 PER L. 16.50

PACCO N. 8

1. Vendreda Klubo, 8.50
2. Tra la Mondo, 6.50
3. Geografia koncepto «Regiono», 1
4. Rimini, 2

TOTALE L. 17 PER L. 12

PACCO N. 9

1. La pesto en Milano, 2
2. De Alpoj al la Maro, 2 kajeroj, 5
3. Terni, 1
4. Esperanto & Interlingua, 1.50

TOTALE L. 7.50 PER L. 5

PACCO N. 10

1. Venecio, 8
2. Manuale di Esperanto, 1
3. Ensorĉo, 1
4. Gefianĉoj, 5-a ĉap., 1

TOTALE L. 11 PER L. 7.50

PACCO N. 11

1. Venecio, 8
2. Trentino, 3.50
3. Rimini 2
4. Italio, 2.50
5. Mantova, 2.50
6. Terni, 1 — 7. Assisi, 2

TOTALE L. 21.50 PER L. 15

PACCO N. 12

1. Lilio, romano, 10
2. Javaj legendoj, 5
3. Tatterley, romano, 5
4. Ok noveloj, 5

TOTALE L. 25 PER L. 18

APPROFITATENE!

Invitare commissioni accompagnate dall'importo all'editore A. Paolet in S. Vito al Tagliamento

En kompostado :

Komerca Vortaro en Esperanto

DE

Robert Kreuz kaj A. Mazzolini

Membroj de Lingva Komitato

Arangita laŭ metodo de Kabe — Proksimume 120 paĝoj poŝformato

Prezo It. L. 12 bindite

Antaŭmendantoj ĝis la 30 aprilo ĝuas rabaton de 15 % — Mendu tuj!

ELDONANTO A. PAOLET - S. VITO AL TAGLIAMENTO (ITALIO)

UN GIORNALINO PREZIOSO

al quale tutti i padri di famiglia dovrebbero abbonare i loro figlioli è



"LO SCOLARO"

settimanale illustrato in 16 pagine appositamente scritte per i piccoli studenti.

Un'annata de « LO SCOLARO » forma un volume di 700 pagine con più di 1000 illustrazioni.

L'abbonamento annuo costa L. 12.80.

LO SCOLARO si trova in vendita presso le edicole. Se ne può avere una copia gratis rivolgendosi all'Amministrazione del Giornale: S. Matteo, 12 - GENOVA.
